



Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 5/6 1967

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Ĉefredaktoro: Johan Hammond Rosbach

3-a periodo
33-a (38-a) jaro
Monata

Mesaĝo de la Prezidanto de UEA:

Rotterdam anstataŭ Tel Aviv

Pro la tragika evoluo de la eventoj en la Meza Oriento, la Estraro de UEA unuanime konstatis, ke la 52-a Universala Kongreso de Esperanto bedaŭrinde ne povos okazi en Tel Aviv. Kvankam LKK volus atendi la okazajn ev ĝis lasta momento, la Estraro opinias, ke ĝi ne povas preni respondecon pri tio. Samtempe ĝi esprimas sian kunsenton al LKK kaj varme dankas pro la, bedaŭrinde vanaj, longaj preparlaboroj. Ankaŭ al la Ŝtatprezidanto, la Alta Protektanto, kaj al ĉiuj israelaj aŭtoritatoj la Estraro de USA esprimas sian sinceran bedaŭron. Ĝi esperas tamen, ke en iu proksima jaro U.K. en Israelo povos realiĝi.

En la nova situacio la Estraro decidis per telefona kaj telegrama voĉdono, post interkonsiliĝo kun la Direktorino de la C.O., ke la 52-a Universala Kongreso okazu en Rotterdam de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto, 1967, do en la samaj tagoj, kiuj estis antaŭviditaj por Tel-Aviv. La programo, fiksitaj tagordoj, diversaj kulturaj kaj distraj aranĝoj estos esence la samaj, sed verŝajne eĉ novaj eroj estos aldonitaj. La Kongreso okazos en la perfekte taŭgaj luksaj salonoj de la ĵus konstruita Koncert- kaj Kongrespalaco De Doelen. La urbaj aŭtoritatoj kaj la turisma servo de Rotterdam donos plenan helpon.

Pro la eksterordinaraj cirkonstancoj, la Kongreso estos organizita rekte de UEA

konforme al la art. 4, lasta alineo, de la Kongresa Regularo. Pro la sama kaŭzo la Estraro decidis escepte longigi la aliĝperiodon ĝis la 15-a de julio laŭ la favoraj kotizoj, validaj fakte nur ĝis la 31-a de marto. Do, por membro-abonanto de UEA: 57,— gld., por nemembroj 77,— gld. Tiuj kiuj, aliĝintaj post 31.3.67 jam pagis la pli altan kotizon, ricevos la diferencon en sia kredito. Ĉiujn detalojn en ligo kun la ŝanĝo de la kongresurbo komunikos la C.O. de UEA en Rotterdam.

En la nomo de la Estraro kaj en mia propra mi turnas min al la tuta esperantistaro kun la plej varma peto doni sian maksimuman apogon al la grandaj streĉoj de la Estraro, de la C.O. kaj de la membraro en Rotterdam organizi imponan Kongreson en nur du monatoj en la tre interesa kaj alloga Rotterdam, kiu estas iusence la ĉefurbo de la neŭtrala Esperanto-Movado. Kompreneble, la aliĝoj faritaj por Tel-Aviv, validas nun por Rotterdam, sed espereble venos amaso da novaj aliĝoj ĝis la 15-a de julio.

La personoj, kiuj pro kiu ajn kaŭzo ne povas ĉeesti la Kongreson, povas tamen helpi per aliĝo laŭ la normala kotizo, aŭ almenaŭ per la t.n. simbola aliĝo, por kiu la kotizo estas nur 25 gld.

Geamikoj tra la mondo!

Montru per amasa apogo vian lojalecon al via UEA; aliĝu multnombre tuj al la Kongreso kaj tiamaniere helpu, ke ĝi estu,

KVINPINTO

La sveda junulara gazeto Kvinpinto havas en sia lasta numero (1, 1967) internacian diskuton pri la problemo de la helpo al evolulandoj. Kelkaj gejunuloj donas siajn opiniojn pri la demandoj ĉu edukado aŭ industriigo estas pli grava, pri du — aŭ multlatera helpo kaj pri familia planado.

La gazeto estas leginda ankaŭ pro la ĉiamaj rubrikoj, ekzemple la poezia paĝo, kiu en la lasta numero estas tre avangarda, kaj la satira paĝo de Markus.

Kvinpinto estas abonebla por 4:- skr ĉe SEJU, Lund, Svedujo, poŝtĝiro 51 33 01. Unuopaj ekzempleroj de la lasta numero estas ankaŭ haveblaj por 1:- sveda krono ĉe Kvinpinto, Box 4235, Malmö 4, Svedujo.

LAVESPA

LAVESPA estas la organizo de invalidaj kaj handikapitaj Esperantistoj. Membreco: 5 nederlandaj guldenoj (aŭ egalvaloro, t.e. norv. kr. 10,00) jare, krom membreco de la oficiala invalidorganizo de sia propra lando. Krome, ĉiun donacon oni akceptas kun ĝojo. De nepagipovaj landoj oni povas pagi per libroj. LAVESPA fondis bibliotekon por la membroj, turistikurojn (10 aŭ plurajn) oni povas uzi por propagando. Ĉion bonvolu sendi al: s-ro Manuel Heidun, Boks 5, *Strib*, Danujo.

2a UZBEKISTANA ESPERANTISTA TENDARO

okazos en Ĥamzaabad, 60 km de Fergana, 13.—25. Aŭg. 1967, kiel kontribuo al la Jaro de Internacia Turismo, proklamita de UNESKO. Ni kore invitas ĉiujn, kiuj deziras konatiĝi kun la uzbekaj kaj aliaj esper-

kiel kulture, impona manifestacio por la neŭtrala Internacia Lingvo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna.

KOMUNIKO DE LA CENTRA OFICEJO

Ĉiuj mendoj kaj pagoj por la 52-a Universala Kongreso de Esperanto restas validaj. Loĝado, ekskursoj, bankedo estas aranĝitaj laŭ la mendoj. La prezoj estos la samaj aŭ iom pli favoraj. Belega tuttaga ekskurso tra sufiĉe nekonata regiono estas preparata. Ĉiuj aliĝintoj ricevos apartan informon.

London-Rotterdam, la 31-an de majo 1967

M. H. Vermaas, Direktorino C.O.

antistoj de Sovet-Unio, kaj kiuj deziras konatiĝi kun la lando kaj ties popolo kaj viziti la antikvajn urbojn Samarkand kaj Buhara. Informojn kaj aliĝilojn vi povos peti de la Esperanto-Komisiono. s.ro Petro Poliščuk, Novo-Moskovskaja 18, kv. 15, *Taškent* 52, U.S.S.R.

Estu memora abonanto de Monata gazeto «El popola Ĉinio»

Por pli akurate informi al esperantistoj de diversaj landoj pri nuna situacio de Ĉinio la dumonata gazeto «El Popola Ĉinio» ekde 1967 aperas MONATE. Por memori ĉi tiun ĝojigan progreson la Libroservo de ĈEL nun komencis disvolvi specialan varbadan kampanjon por kolekti memorajn abonantojn. La kampanjo daŭras ĝis 31.7.1967. Ĉiu, kiu abonas EPC en tiu periodo, ĝuas favoran abonprezon kaj povas ricevi memoraĵon — Esperantan Notlibron. Jarabono: £ 0—5—0 (validas ĝis 31.7.1967). La koncernen faldfoliojn kaj provspecimenon de EPC oni povas peti senpage de ĝiaj diverslandaj perantoj aŭ rekte de la Libroservo de ĈEL, P.O. Kesto 31,3, Pekino, Ĉinio.

DONACIOJ AL LA KONTORFONDAĴO

Trygve Raimar	kr. 50,00
R. Berli	» 5,00
Otto Koren	» 50,00
Torstein Andersen	» 10,00
G. Ringstad	» 10,00
K. Gustavsen	» 22,50
O. Rygg	» 100,00
R. Bugge-Paulsen	» 30,00
Bodø Esp.klubb	» 62,00
Bj. Aandahl	» 10,00
Aage Falch	» 7,00
Edith Stray	» 50,00
Mo Esp.klubb	» 50,00
John Selbekk	» 100,00
B. Wærnes	» 20,00
R. Winsnes	» 120,00
C.S.B.	» 40,00
Harda Danielsen	» 30,00
O. Pehrson	» 100,00
Kontribuo de Klubo Esperantista en Oslo	» 100,00
kr. 966,50	

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20-a en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,00

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,00
1/2 p. kr. 75,00, 1/4 p. kr. 38,00,
1/8 p. kr. 19,00.

Rotterdam

Ni devas esprimi nian admiron al UEA, Kiu povas kaj Kuraĝas aranĝi Universalan Kongreson en Rotterdam nur kelkajn semajnojn antaŭ la okazo de la renkontigo.

Ni devas ankaŭ montri al la frontpaĝo artikolo, la mesaĝo de D-ro Lapenna, kaj al ties alvoko, ke vi amase montru la lojalecon al UEA per aliĝo al la UK.

Kaj ni deziras al ĉiu bonan someron!

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj okazos 23.—30. de julio en La internacia Altlernejo (tute modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Abybøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la alternejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 15.—21. de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

SCIIGOJ DE N.E.L.

Aŭtuna kursagado. Nun estas la tempo, kiam la klubaj estraroj devas plani la Esperanto-kursojn aranĝotajn dum la venonta aŭtuno. Ĉiu klubestraro devas nun serioze pritrakti tiun demandon. Ne diru ke ne anoncos sin kursanoj, sed faru konkretajn planojn pri intensa varbagado je la komencigo de la aŭtuna sezono. La jarraporto de N.E.L. (vidu en n.ro 3) montras ke ankaŭ en 1966 daŭris la malkreska tendenco de la membronombro. *Urĝas baltigi tiun tendencan* kaj turni ĝin en kreskon. Sertoj jam montris ke per insista klopodado kursoj estas ankaŭ nun starigeblaj. Senescepte ĉiuj kluboj kaj laŭeble multaj el la rektaj membroj devas stariĝi kursojn dum la venonta aŭtuno. Nur per kursaranĝoj oni povas kreskigi la membraron de la kluboj kaj fondi klubojn en novaj lokoj. N.E.L. estas preta helpi per kursmaterialo kaj konsiloj. Statan subvencio por la salajro de la kursgvidanto oni povas ricevi. Kie neniu loka samideano povas gvidi kurson, oni klopodu fondi studrondon por komencantoj per la koresponda kurso. Petu pri nia studplano. Krome oni klopodu igi lokan gazeton publikigi la gazetkurson (skribu al N.E.L. pri plano kaj provlecio). Sed komencu jam nun prepari la aŭtunajn kursojn!

Taskotabelo por la kluboj. — Junio:

La estraro planas la aŭtunan laboron kaj precipe decidas detalojn rilate la aŭtunajn kursojn.

Julio: Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 2a jarkvarono kun studraporto pri la 1a jaruono dorsflanke (blankedo A 10/E 1).

Aŭgusto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro zorgas pri kursejo kaj kurspropagandiloj.

Septembro: La kursoj komenciĝas. La studgvidanto refunkciigas la studrondojn kaj fondas novajn. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. *La Liga Estraro.*

Hipokrene:

La Monumento

Post decido de konsilo
pasis multaj jaroj.
Sed nun staras en sunbrilo
fine, post preparoj
por la granda festa tago,
alta monumento,
kaj apude flirtas flago:
Venis la momento!
La urbestro ekparolas:
«Nia granda filo —
tiel samurbanoj volas
kaj la urbkonsilo —
estu ĉiam honorata,
estu ĉiam nia;
lia faro bravsoldata
instigilo via!»

Nun aplaŭdo manoklaka
ekaŭdiĝas ĉie,
sed kun signo ambaŭbraka
li parolas plie:
«Nia fama generalo,
filo ĉi-vilaĝa,
estis en liber-batalo
certe plej kuraĝa.
Ne malplej pro lia faro
havas ni liberon,
kaj la tuta urbanaro
havas la esperon,
ke ĉi-tiu monumento
de la generalo
estu por patruja sento
vera startsignalo!»

Sur la alta monumento
ĉirkaŭanta tolo
flirtas en facila vento
dum la festparolo.
Streĉe ĉiu nun atendas
falon de l'vualo.
Sed ĝi daŭre kaŝe pendas
sur la generalo.
Post finitaj festparoloj
sonas la tamburoj.
Tuj streĉiĝas ok cent koloj.
Per du fortaj ŝnuroj
tolon tiras for urbestro,
kaj solenfikas,
ke la urba blovorkestro
marŝe ekmuzikas.

Sed aplaŭdaj manoklakoj
ne tre longe daŭras,
ĉar kun etenditaj brakoj
la heroo kaŭras!
Oni flustras pri skandalo,
oni mire gapas,
ĉar la poz' de l'generalo
strange okulfrapas.
Jam klarigon oni krie
petas kaj postulas.
Pro protestoj baldaŭ ĉie
ĉagreniĝ' ekbrulas.
Kaj akriĝas sian tonon
homamasa muro:
«Ĉu kolektis vi la monon
por karikaturo?»

La urbestro digne vortas:
«Karaj civitanoj,
la elspezojn vi ja portas,
sed pri niaj planoj
certe vi ne bone scias.
Nia komitato,
kiun mi ne tre envias,
en fiksita dato
mendis bronzan monumenton.
La skulptisto faris
tiun belan fundamenton,
kiu preta staris,
poste — laŭ persona kono —
nian generalon,
sed pro nesufiĉa mono
faris ne ĉevalon!»

Per Johan Krogstie:

La St. Mikaelpreĝejo sur la Rokomonto en Løten

Sudorienten de la stacidomo, kie estas la
komunuma administra centro, kondukas mal-
larĝa landstato.

Kurbigante ĝi trakondukas la densan arba-
ron ĉirkaŭ 10 kilometrojn al la ĉarma Roko-
lago, kie multaj homoj el Løten konstruis
kabanojn, kie ili somere loĝas por naĝi kaj
fiŝkapti, aŭ por pluki mirtelojn, vakcinojn
kaj frambojn en la arbaro, aŭ hamemorojn
sur la marĉoj. Dum sunplenaj vintraj tagoj
ili kultivas la skisporton, aŭ ili traboras la
glacion por fiŝkapti tra la truoj. Krute de la
lago, la Rokomonto levigaĝis ĝis la pinto je
350 metroj super la marnivelo.

De tiu montpinto estas belega panoramo.
Norden kaj orienten oni vidas en la naj-
barkomunumon Elverum, kie en la valo la
rivero Glomma serpentumas kiel argenta
rubando.

Malproksime ĉe la orienta horizonto, oni
dum sennubaj tagoj povas vidi la deklivojn

kie la landlimo al Svedujo tratanĉas la pej-
zaĝon.

Sude estas videbla la Skreiamontaro —
situanta sur la alia flanko de lago Mjøsa.

Nord-okcidente estas la Løten-kamparo,
kun la svelta, bela turo de la ĉefpreĝejo en
Løten en la centro de la komunumo. Ĝi kon-
struiĝis en la 1250-jaroj.


Okcidente oni vidas la komunumon Vang
kaj la urbon Hamar ĉe Mjøsa, kaj la riĉajn
agrikulturajn regionojn ĉirkaŭ ĝi.

Sed la ĉefparto de la panoramo estas mejl-
vastaj arbaroj, kaj malsupre de la monto
estas la idilia Rokolago, kiel ridetanta okulo
en la arbaro.

Tie, je la pinto de la Rokomonto, situas
la ruinaĵo de la St. Mikaelpreĝejo.

La ruinaĵoj tute ne estas grandaj kaj
imponaj.

Estas nur restaĵoj de la muroj en alteco de
ĉirkaŭ 1 metro.



La panoramo de la preĝejruinaĵo en Rokoberget, ĉe la orienta horizonto oni dum sennubaj tagoj povas vidi la deklivojn kie la landlimo al Svedujo tratanĉas la pejzaĝon.

La preĝejo estis malgranda, mezurante nur 10 x 16 m. Nuntempe la ruinaĵoj estas en preskaŭ dezerta regiono.

Anstataŭ sonoradon, oni nur aŭdas la tintilojn de herbmanĝantaj bovinoj kaj ĉevaloj, kaj sur la iama altarŝtono, kaj en la arboj, la kantbirdoj prizorgas la meskantadon.

Pastro estas la grandega naturo, ĝi faras al vizitanto sian bonan predikon, se oni havas tempon por aŭskulti. Oni devas demandi sin, kial la prapatroj konstruis preĝejon en tiu preskaŭ nelogata regiono.

Konsiderante la geografian situon de la loko, kaj ion sciante la historion de la popolo, oni pli bone komprenas la kialon.

La plej mallonga kaj plej facila vojo de Oslo al Trondhejmo kondukas tra Løten, tiel ankaŭ en la estinteco.

Dum la unua kristana epoko en nia lando, la pilgrimoj tranoktis sur la Rokomonto, dum sia irado al la ĉerko de St. Olav en la Nidaroskatedralo en Trondhejmo.

La epoko ĉirkaŭ la jaro 1000 estis granda tempoŝanĝo en Norvegio.

Ĝis tiam la norvegoj estis kruelaj vikingoj, timindaj rabistoj paganoj kun sovaĝaj kutimoj. Du reĝoj, nome Haakon 1. (Haakon la bona) reĝo 935—960, kaj Olav 1. — filo de Trygve, reĝo 995—1000, vane provis enkonduki la kristanismon en nian landon.

Inter la jaroj 990 kaj 1000 Olav Haraldson naskiĝis. Dum sia juneco li estis sovaĝa vikingo. Sed dum vizito en la franca urbo Rouen en la jaro 1013 la juna vikingo ekaŭdis preĝejajn sonorilojn kaj meskantadon. Tie li faris la gravan decidon fariĝi kristano, kaj li baptiĝis. Olav tute ne estis nobla karaktero, sed li certe perceptis la lumon de la kristanismo, kaj li donis al si la taskon, enkonduki la novan religion en Norvegujon, kaj porti al la norvegan popolon la sanktajn vortojn de Dio.

Ĉirkaŭ la jaro 1015, li komencis sian regadon en Norvegujo, kaj per granda krueleco li devigis la popolon konfesi sin al la kristana kredo.

Nuntempe oni povas akuzi reĝon Olav por teroro, sed oni devas konsideri, ke humanismo estis tute nekonata ideo por la tiamaj homoj.

Por atingi sian celon, estis nepre necese por li agi forte kaj severe. Se ne, la sovaĝaj paganoj certe venkus lin.

Reĝo Olav vere amis Norvegujon, kaj estis sendube granda doloro por li, kiam li en la jaro 1028 devis fuĝi de la lando.

Sed li kredis je sia granda tasko, kaj somere en la jaro 1030 li revenis el Svedujo kun granda armeo.

Apud Stiklestad en la Trondhejmregiono, li renkontis sian malamikaron, la bienulan armeon.

Tie ekestis granda batalo inter la du armeoj, kaj la 29an de julio li perdis la vivon, mortigita de la bienula militisto Tore Hund.

La historio rakontas ke samtempe kiam reĝo Olav mortis, okazis tutplena suneklipso en la Stiklestadregiono. Tore Hund dum la batalo kun la reĝo vundiĝis, sed laŭ la legendo, la sango fluanta de la mortigita reĝo Olav, sanigis lin.

Tore Hund kristaniĝis, kaj la legendo rakontas ke li mortis dum pilgrimado al la Sankta Tombejo en Jerusalemo. Eĉ nuntempe vivas legendoj pri la mirakloj kiujn faris la reĝo, kaj pri la sanigaj fortoj de lia mortinta korpo. Post la batalo li entombiĝis en la riversablon, sed la sablo elskuis la ĉerkon.

Oni malfermis ĝin, kaj oni vidis ke lia hararo kaj barbo kreskis post la morto.

Tion oni konsideris kiel certa signo pri lia sankteco, kaj la 3an de aŭgusto 1031, la episkopo Grimkel deklaris lin sanktulo.

Denove li enĉerkiĝis, sed nun en argenta ĉerko, kiun oni metis sur la altaron de la Nidaroskatedralo en Trondhejmo, kaj pro la multaj mirakloj, la popolo nomigis lin: Olav La Sankta — perpetuus rex Norvegiae. (La eterna reĝo de Norvegujo). Nun la vikinga epoko por ĉiam finiĝis.

Anstataŭ rabiradi al fremdaj landoj, la norvegoj nun komencis kultivi la teron kaj ordigi siajn enlandajn aferojn, — jen la plej evidenta rezultoj de la vivverko de reĝo Olav.

La kristana religio sendube portis multe da lumo kaj feliĉo al la malfacila vivmaniero de la mezepokuloj. Certe ili sentis sin dankŝuldaĵoj al la mortinta reĝo — ilia peranto al Dio.

En grandaj amasoj, — ne nur el Norvegujo, — la homoj komencis pilgrimadi al la katedralo en Trondhejmo.

Bone oni povas kompreni, ke la eksterlandanoj sentis dankemon al reĝo Olav.

De nun ili ne plu devas timi la kruelajn atakojn de norvegaj vikingoj.

Vaste en la mondo troviĝas Olavmemoraĵoj de la mezepoko.

En Finnlando estas kastelo kun la nomo Olavinlinna, — eĉ en la Naskiĝpreĝejo en



La komunumestro de Løten, Ole Skaugerud, rigardas la ruinaĵojn de la iama St. Mikael-preĝejo.

Betleĥemo ekzistas pentraĵo pri li, pentrita en la 1170 jaroj.

La 29an de julio — la tago kiam Olav mortis, oni celebris kiel festotagon tra tuta Skandinavio.

De la literaturo, unuavice de «Historio pri norvegaj reĝoj», verkita de Snorre Sturleson, kaj de la historiaj verkoj de Sigrud Undset, oni ekhavas bonan impreson pri la pilgrimado al Trondhejmo.

Inter la dikaj ŝtonmuroj de la katedralo, en la duonlumo, ili adoris Dion.

Tuŝante la sanktan ĉerkon sur la altaro, la kripluloj resaniĝis, kaj la blinduloj rehavigis la vidadon.

Dum sia vagado tra la lando, la pilgrimoj postlasis multajn aĵojn.

Kelkloke staris apud la vojo krucifikso, — aliloke ili desegnis krucojn aŭ aliajn kristanajn simbolojn en ŝtonegojn, eĉ nuntempe videblajn.

Eble kelkaj loknomoj devenas de tiu epoko, ekzemple la biennomo Korslund (La Krucbosko) en Stange kaj en Løten, Povas

esti, ke tie staris krucifiksoj en la unua kristana epoko.

Same estas eble, ke kelkaj rokoj en Åmot en Østerdalen kun la nomo Pilgrimsskjærene (La Pilgrimrokoj) iam estis ripozejo por la vagantoj.

La pilgrimoj ankaŭ bezonis tranoktejojn, kaj unu el ili estis la preĝejo sur la Rokomonto en Løten.

Dum la pagana epoko eble estis kultdomo sur la sama loko.

Ĉie en la ĉirkaŭaĵo estas ŝtonamasoj, kiuj estas tomboj de la bronza epoko, kaj sur la fundo de la Rokolago oni trovis boatojn de tiu epoko. Ili estas kavigitaj arbrunkoj. Eble la unuaj kristanoj nur iom aliĝis la antaŭan paganan kultdomon al kristana preĝejo.

Tien venis homoj el ĉiu direkto, kaj de multaj landoj. Monahoj de sudaj landoj, tranoktinte en la preĝejo, plantis sur la preĝeja tereno fremdajn plantojn, kiujn ili kunportis de siaj hejmlandoj.

Certe estis tie belegaj ĝardenoj, formitaj

en terasoj, kies restaĵoj oni nuntempe povas trovi en la deklivoj.

Tie kreskas specoj de arboj kaj plantoj, kiujn oni ne trovas sovaĝkreskantaj aliloke en Loten, ekzemple la rikarboj. En Tøyenhaven la botanika ĝardeno en Oslo estas ekzempleroj de taksuso, trovitaj en la iama preĝeja ĝardeno en la Rokomonto. Nuntempe taksuso estas elmortinta plantspeco en la Rokomonto.

La ekleziuloj certe fiŝkaptis en la Rokomonto.

En golfeto mi trovis restaĵojn de fiŝputo kun muroj de lignaĵo. Ĉar la ĉarpentlignaĵo ĉiam estis subakvigita, ĝi preskaŭ ne detruigis de putrado, ĝi nur mallevigis kaj kaŝigis de verdaĵo, floroj kaj arboj. Rigardante ĝin, oni dovas miri: — Ĉu la fiŝputo devenas de la mezepoko, kaj estas riparita kaj uzita de postaj generacioj?

Cu tien la monaĥoj, fiŝkaptinte verŝis la vivantajn perkojn kaj ezokojn, por poste laŭbezone akiri freŝajn fiŝojn por tagmanĝo?

La komunuma historilibro, «La Lotenlibro», nenion rakontas pri la fiŝputo.

La vigla migrado de la pilgrimoj faris el la St. Mikaelpreĝejo veran kulturcentron, kaj cetere centron por riĉeco kaj potenco.

Legendo rakontas, ke tie troviĝis ampleksa biblioteko, kaj ke tiu estis translokigota al la katedralo en Hamar, sed ke ĝi perdiĝis survoje tien. La transporto konsistis el 20 sledoj.

La fakto estas ke la preĝejo posedis vastajn arbarojn, kaj ke ili enspezis multe da mono.

Tion pravas papletero, datumita la 11an de februaro 1254.

Per tiu dokumento la papo asignas al kanoniko Theodorus la enspezojn de la St. Mikaelpreĝejo sur la Rokomonto, kiel rekompencan, pro tio ke li ne farigis episkopo en Hamar diocezo. Nuntempe la arbaroj apartenas al la ŝtato.

Sed en la 14a jarcento okazis io, kio finis la viglan trafikon de pilgrimoj.

Tiam venis al la lando la terura abcespesto, la tielnomata 'nigra morto'.


La grandparto de la norvega popolo mortis, unuavice la plej eminentaj familioj.

Samtempe mortis la reĝo, kiu estis la lasta ano de la malnova norvega reĝfamilio, kaj nia lando unuiĝis kun Danujo.

En tiu unuiĝa epoko la lando pli kaj pli ruiniĝis — kaj kulture kaj ekonomie.

En la 1540-jaroj, la tiama reĝo ordonis,

ke la popolo en Danujo kaj en Norvegujo transiru al la nova Luther-evangelia ekleziasistemo, kun la reĝo kiel la plej supera surtera eklezia ĉefo.



Oficiro kies nomo estis P. Ram, kiu en la jaro 1835 vizitis la preĝejuinajon, enhakis en murŝtono, norveglingve, la vortojn: Detruita en la jaro 1567.

PROTOKOLO

PRI LA ĜENERALA KUNSIDO DUM LA LANDA KONGRESO DE N.E.L.

EN SAUDA 14-a — 15-a de MAJO 1967

La laborkunveno okazis en la bela Sauda Klubb kaj komenciĝis je la 9.30-a. La prezidanto de Sauda Esperantoklubb, Johan Matland, en nomo de la aranĝantoj bonvenigis kaj donis la parolon al prezidanto de N.E.L., C. Stop-Bowitz, kiu klarigis pri jena

Tagordo:

1) *Malfermo per la prezidanto.* Stop-Bowitz unue dankis pro la bona akcepto en Sauda kaj salutis la ĉeestantojn. Poste li menciis la plej gravajn okazintaĵojn post la lasta landa kongreso en Oslo antaŭ 2 jaroj. Li memorigis jenajn membrojn de N.E.L. forpasintajn en la 2 lastaj jaroj:

Didrik Mjølhus, Skudeneshavn,
John Bjørgum, Trondheim,
Magnus Tveit, Trondheim,
Nanna Dahl Johnsen, Drobak,
Chr. Berg, Sulitjelma,

Harald Houen, Stavanger
Johan Bøe, Leknes i Lofoten,
Johan Snekvik, Oslo,
Majken Jørgensen, Bergen,
Evald Danielsen, Halden,
Margaretha Almquist, Oslo,
Edv. Strand, Melandsjø,
Liv Beckstrøm, Porsgrunn,
Lars Oftedal, Loten,
Per Vasmoen, Tynset,
Bjarne Sørsdal, Sjøstad.

Oni honoris la mortintojn per mallonga silento. — Post tio li deklaris la laborkunvenojn malfermitaj.

2) *Elektado de kunvenaj funkciuloj:* Elektiĝis jenaj: Protokolantoj: Aslaug Refsing kaj John Berggreen, ambaŭ Oslo, Kunvena prezidanto: Johan Matland, Sauda, kiu tuj transprenis la martelon kaj la gvidadon de la laborkunsido, Elekta komitato: Harda

Sendube tio estis tre ruza politiko de la reĝo, tiel li ja transprenis la riĉajn havaĵojn de la eklezio.

Li malpermesis ĉion kio memorigis pri katolikismo, inter alie pilgrimadon al Trondhejmo kaj aliaj sanktaj lokoj.

Unu el la rezultatoj estis ke la St. Mikaelpreĝejo en Loten restis forgesata, ĉar ĝia ekzistado dependis de la pilgrimado.

Oni supozas, ke svedaj soldatoj dum la milito en la jaro 1567 rabis kaj detruis la preĝejon, kaj ke ili subakvigis la preĝejaĵojn sonorilojn en la Rokolagon.

Oficiro kies nomo estis P. Ram, kiu en la jaro 1835 vizitis la preĝejuinajon, enhakis en murŝtono, norveglingve, la vortojn: «Detruita en la jaro 1567.»

Legendo diras, ke la preĝeja pordo de la svedaj soldatoj transportiĝis al Svedujo, kaj ke ĝi eble hodiaŭ estas en la preĝejo en Malung en la gubernio Dalarna. Pri tio oni nur povas forte dubi.

En la jaro 1597 — nur 27 jarojn poste, la episkopo de Oslo, Jens Nilsson vizitis Loten.

En sia vizitlibro li skribis ke «Roko preĝejo estas sen pastro».

Pri detruado de la preĝejo li nenion mencias, kaj oni devas supozi ke li interparolis kun personoj tie, kiuj vivis dum la milito en 1567.

Certe ili tre multe povus rakonti pri tiu drama okazintaĵo, se ĝi vere estus okazinta.

Krom la mallonga notaĵo de la episkopo farita en 1594, oni ne multe scias pri la sorto de la preĝejo post la reformacio.

Oni povas supozi, ke plej grandaj vandaloj estis la bienuloj en la ĉirkaŭaĵo.

Inter la ruinaĵoj sur la Rokomonto la arĥeologo kaj inĝeniero Svendsen komencis esplorfosadon en la jaro 1907.

Inter alie li trovis 5 homajn skeletojn, cetere bele hakitajn ŝtonojn kaj cindrigitajn restaĵojn de trabaĵo.

Li konkludis, ke iufoje fajro, eble sekve de fulmobato, detruis la preĝejon, kaj kion la fajro ne povis ruinigi, la homoj ruinigis.

Antaŭ kelkaj jaroj, monrimedoj kolektiĝis por la celo rekonstrui la preĝejon, sed nuntempe ŝajnas, ke neniu havas intereson pri tiu projekto.

Danielsen, Oslo, Sig. Sørensen, Kristiansand, Olav Thormodsen, Haugesund. Komisiono pri plenrajtoj kaj voĉnobrado: Ole Johan Rønnevig, Haugesund, Karen Kluge, Stavanger, Tharald Dybing, Oslo. La kontrola komitato poste prezentis sian raporton, kiu montris ke jenaj reprezentantoj ĉeestis:	Nombro de voĉoj:	
Nomo:	Nombro de voĉoj:	
Konsilantaroj:		
C. Støp-Bowitz	1	
Harda Danielsen	1	
Frank Aasheim	1	
Trygve Kvalvåg	1	4
Bergen, La Esperantoklubo de		
Elsa Njåten-Vernor	1	
Doris Birkelund	1	
Annemor Bye	1	
Johan Dahl	1	
Leonora Sivertsen	1	
Kristian Sivertsen	1	6
Gjøvik, Klubo Esperantista de:		
C. Støp-Bowitz (Oslo)	1	
Hamar, La Norda Stelo:		
Ludvig Anjer (Oslo)	4	
Haugesund, Mara Vento:		
Johannes Sortland	2	
Lovise Sortland	2	
Ole Johan Rønnevig	2	
Olav Thormodsen	2	
Klara Dahl	2	10
Kristiansand, Kristiansands Esperantoklubb;		
Maria Hauge	1	
Magne Stiansen	1	
Sigurd Sørensen	1	3
Løten, La tri verdaj steloj de:		
John Berggren (Oslo)	2	
Odda, La Glaciario:		
Oddvard Øvsthus	1	
Oslo, Klubo Esperantista en:		
C. Støp-Bowitz	1	
John Berggren	2	
Chr. Mortensen	2	
Harda Danielsen	2	
Aslaug Refsing	2	
Brynhild Østmo	2	
Marit Delor	1	
Otto Prytz	2	
Rolf Bugge-Paulsen	2	
Ruth Herlofson	2	
Frank Aasheim	1	
Else Bugge-Paulsen	1	
Gerd Jæger Pettersen	1	
Tharald Dybing	2	
Ludvig Anjer	2	
Agnete Anjer	1	
Bjørn Ottesen	1	
Eva Støp-Bowitz	1	28
Sarpsborg, La Urso:		
C. Støp-Bowitz (Oslo)	4	
Sauda Esperantoklubb:		
Johan Matland	1	
Elna Matland	1	
Olav Andersen	1	
Arthur Bjerke	1	
Stavanger Esperantoklubb,		
Asbjørn Kvalvåg	1	
Trondheim,		
Grupo Esperantista de:		
David Termén	8	
		Entute 76 voĉoj

3) *Jarraportoj 1965 kaj 1966:* La jarraporto por 1966 estis legata de C. Støp-Bowitz kiu korektis 2 prezerarojn pri la membrostatistiko nome 104 ordinaraj rektaj membroj anstataŭ 10, kaj entute 550 membroj anstataŭ 551. Berggreen petis la parolon kaj proponis ke oni estonte prezentu la membrostatistikon alimaniere, nome tiel ke ĉiuj membroj de la kluboj estu enkalkulitaj en la kluba statistiko, kaj ne la membroj subtenantaj, dumvivaj aŭ honoraj, eliritaj. La prez. de N.E.L. promesis pripensi tiun ŝanĝon. La reprezentantoj havis ankaŭ la jarraporton por 1965 antaŭ si por komparo, kaj ambaŭ jarraportoj estis aprobataj.

4) *Jarkalkuloj por 1965 kaj 1966:* La jarkalkulon 1966 legis Trygve Kvalvåg, dum oni havis antaŭ si tiun pri 1965 por komparo. R. Bugge-Paulsen anonce serĉis la subskribon de la alia revizoro Karin Sandberg, kaj la kunvenantoj aprobis la proponon ke estonte ambaŭ revizoroj subskribu la kalkulojn. Cetere ambaŭ jarkalkuloj de N.E.L. kaj de la Korespondaj Kursoj estis aprobataj.

5) *Alvenintaj proponoj:*
a) *Statuŝanĝo:* La Liga Estraro prezentis proponon pri statuŝanĝo en § 13 pri reprezentado, celantan doni minimume 1 voĉon al

ĉiu ĉeestanta membro dum la laborkunsidoj kaj ke ĉiuj kluboj havu tiom da voĉoj kiom ili havas membrojn.

Berggreen deklaris sin samopinia kun la intenco de la propono sed ne pri la punkto pri disdono de la klubaj voĉoj kiuj laŭ la propono estos disdonataj de la komisiono pri plenrajtoj kaj voĉnobrado. Li proponis ke tio estu tasko de la kluba estraro. Okazis vigla diskuto en kiu jenaj partoprenis (krom Berggreen): C. Støp-Bowitz, L. Anjer, Elna Matland, Prytz, Leonora Sivertsen, R. Bugge-Paulsen. Fine oni aprobis jenan tekston kiel *novan* enhavon de § 13 (la substrekitaj linioj estas novaj kompare kun la propono de la Liga Estraro, laŭ propono de Ludvig Anjer al kiu Berggreen deklaris sin samopinia):

§ 13, 1. avsnitt og første 2½ linje av 2. avsnitt utgår og erstattes med: «Ethvert møtende medlem har stemmerett på landsmøtet. Enhver Esperanto-forening som er tilsluttet Forbundet, har så mange stemmer som den har medlemmer. Stemmetallet regnes på grunnlag av det antall medlemmer som det ble betalt for i foregående år, men baseres på inneværende års medlemstall om dette er høyere. Foreningene har rett til å fordele stemmene for de ikke møtende medlemmer på medlemmer av foreningen som møter på landsmøtet. Hver forening sender minst 8 dager før landsmøtet Forbundsstyret en stemmefordelingsinstruks som angir på hvilke medlemmer og i hvilket forhold disse stemmer skal fordeles. Fordelingen foretas av landsmøtets fullmaktskomité forholdsvis mest mulig overensstemmende med klubbens instruks, eller hvis instruks ikke er mottatt, mest mulig likelig på de tilstedeværende medlemmer av vedkommende klubb. Stemmeberettigede som forlater møtet, kan ikke overdra sin(e) stemme(r) til andre. Et møtende medlem kan ved fullmakt avgi stemme også for medlemmer av en annen forening innen samme krets.»

Resten av avsnitt 2 blir stående uforandret, nemlig: «Foreninger på steder som er beliggende mer enn 500 km (eller en avstand som Forbundsstyret bestemmer, dog ikke under 300 km) i luftlinje fra landsmøtstedet, har anledning til å sende inn skriftlig stemme om de saker som er satt opp på dagsordenen. Det tas hensyn til avstand og reiseomkostninger.»

Resten av § 13 (d.v.s. avsnittene 3, 4 og

5) utgår.

La nova statuŝanĝa propona estis aprobata kontraŭ 2 voĉoj (74 por).

b) *Rezolucioj:* Post iom da diskuto oni aprobis jenajn:

1. Proponita de la Liga Estraro kaj aprobata de la Landa Kongreso por 63 voĉoj por, neniuj kontraŭ sed 13 sin detenis: «La 40-a Landa Kongreso de Norvega Esperantista Ligo en Sauda 13.—15. majo 1967 konstatinte ke inter la esperantistoj ekzistas du interpretoj de la pasivaj participoj, ke inter la anoj de ambaŭ interpretoj troviĝas fidelaj adeptoj de Zamenhof kaj de la Fundamento, ke oficiala decido por unu el la du interpretoj povos malhelpi la enkondukon de Esperanto kiel facila internacia lingvo en la lernejoj de iuj landoj, kaj eĉ krei danĝeran skismon en nia movado, admonas serioze al la Akademio de Esperanto *ne* alpreni decidon en la participa demando por unu el la du interpretoj kaj kontraŭ la alia, sed lasi la solvon al la natura, libera evoluo de la lingvo.»

2. Proponita de la Liga Estraro kaj aprobata de la Landa Kongreso per 76 voĉoj (t. e. unuanime): «La 40-a Landa Kongreso de Norvega Esperantista Ligo en Sauda 13.—15. majo 1967 konsiderinte la Alvokon de januaro 1967 de Aŭstria Esperanto-Instituto en kiu la Instituto avertas kontraŭ la kreskanta malfaciligado de Esperanto per enkonduko de ĉiam pli multaj nenecesaj neologismoj, apogas tiun prudentan averton, kaj substrekas ĝian principan rekomendon, kiu tekstas: «Praktikante la internacian lingvon Esperanto ni uzu prefere la vortojn fundamentajn kaj oficialajn, kaj nur se neniuj el ili sufiĉas, ni uzu alian esprimon.»

3. Publikaj rezolucioj: Estis prezentataj diversaj ideoj pri rezolucio publika: Pri turismo, lernejoj, Norsk Kulturråd, sportorganizaĵoj, Norges Ungdomsherberger, U.N. Jena komisiono elektigis por prezenti proponon pri tia rezolucio: L. Anjer, O. Thormodsen kaj Elna Matland. La komisiono poste proponis jenajn rezoluciojn, kiujn la Landa Kongreso unuanime aprobis:

I.

Norsk Esperanto-Forbunds 40. Landsmøte vil i forbindelse med Det Internasjonale år for Turismen få peke på de store fordeler som et felles internasjonalt språk vil gi turistlivet, og henstiller til Landslaget for Reiselivet i Norge å gå inn for øket bruk av Esperanto i reiselivet, ved å oppfordre de foretagender, institusjoner og organisasjoner hvis virksomhet er knyttet til reiselivet, til i større utstrekning å benytte Esperanto i sin Norgesreklame, og ved selv å utgi sine trykksaker på Esperanto i tillegg til utgaver på andre språk.

Forbundet står gjerne til tjeneste med opplysninger i sammenheng med tekster på Esperanto, distribuering av informasjonsmateriale på Esperanto og den verdensomspennende personlige turisttjeneste som blir utført gjennom Universala Esperanto-Asocios konsultatsystem, som omfatter omkring 3 500 delegater i alle verdensdeler.

II.

Norsk Esperanto-Forbunds 40. Landsmøte fastslår at den internasjonale henvendelse om Esperanto til FN i sammenheng med Året for Internasjonalt Samarbeide, har møtt sterk interesse og tilslutning også i Norge, og retter en takk til pressen for dens bistand med å gjøre saken kjent og til alle enkeltpersoner og organisasjoner i landet som har støttet henvendelsen med sin underskrift.

Da det i alle verdensdeler stadig strømmer inn underskrifter til henvendelsen gjennom de enkelte landsforbund, vil også Norsk Esperanto-Forbund fortsatt formidle tilslutning til den gjennom verdensforbundet Universala Esperanto-Asocio, og er i den sammenheng rede til å gi all ønsket orientering til enkeltpersoner og organisasjoner som ennå ikke har funnet anledning til å slutte seg til henvendelsen.

4. Laŭ ensendita propono de C. Stöp-Bowitz kaj John Berggreen kaj kun aprobo de la Liga Estraro jenaj novaj *honoraj membroj* de N.E.L. elektigis unuanim: Aagot Sletterød kaj Bjørn Ottesen, ambaŭ Oslo.

6) Diskuttemo: «Kiel denove *aktivi* la norvegan Esperanto-movadon kaj *kreskigi* la

membro-nombrojn?» Post enkondukaj vortoj de C. Stöp-Bowitz komenciĝis longa kaj tre vigla diskuto pri ĉi tiu temo, kiu ja estas trege grava por nia organizajo. En la diskuto partoprenis jenaj: Prytz, Tr. Kvalvåg, Berggreen, Elna Matland, R. Bugge-Paulsen, Aasheim, Maria Hauge, L. Anjer, Asbjørg Kvalvåg, Matland, C. Stöp-Bowitz, Leonora Sivertsen, Marit Delor, Chr. Mortensen, Ruth Herlofson kaj Brynhild Østmo. Estas neeble en ĉi tiu raporto citi ĉion kio estis prezentata dum la tre interesa diskuto, sed vere prezentigis multaj bonaj ideoj kaj proponoj. La kvintesenco de la diskuto — kiu daŭris dum multaj horoj diamanĉon kaj lundon — estis la jena:

Oni bezonas novajn membrojn por kompensi la naturan eligon el la klubaj membroj, precipe *junajn* novajn membrojn, sed eĉ pli grava estas la *aktiviĝo* de la nunaj membroj por ke ĉiuj klubanoj estu taŭgaj helpantoj en la *informada laboro* kiu estas nia plej grava tasko; oni devas atenti la grandan aron da antaŭaj membroj kiuj forlasis la klubojn kaj serĉi la kialon kaj la rimedon por rea iri ilin; oni kritikis la statutan paragrafon pri devigaj jarkvaronaj raportoj; ni bezonas monon por fari pli efikan kaj modernan informadon eble per subvencio flanko de organizaĵoj kiel «Norsk Kulturråd» aŭ «Kontoret for Kulturelt Samkvem med Utlandet»; oni parolu rekte kun la aŭtoritatoj pri Esperanto, ankaŭ kun la estroj de la politikaj partioj kaj kun la parlamentanoj; oni devas pli bone kontakti la novajn esperantistojn kaj ne fari proprajn rondojn por la malnovaj klubanoj; atentu la signifon de instruado por ke la membroj komprenu ne nur Esperanton sed ĝian internan ideon; la kluboj devas kunlabori kaj interŝanĝi prelegantojn kaj ideojn pri la klublaboro; oni devas eluzi la semajnajn revuojn kaj tagajn gazetojn per informaj artikoloj kaj anoncoj pri Esperanto; en nia laboro ni devas atenti kaj sekvi la laborplanon de N.E.L. (konforme al la Dua Baza Laborplano de U.E.A.).

La konkludo de la tuta diskuto estis forta deziro pri analizo de la situacio kaj rimedoj taŭgaj por trovi novajn vojojn en la laboro por Esperanto.

Fine prezentigis jena propono de Frank Aasheim, kiun oni unuanim aprobis: «På bakgrunn av diskusjonen og forslag på Landsmøtet i Sauda 1967, nedsettes en komité med det mandat å analysere dagens situa-

sjon i Esperanto-bevegelsen i Norge og sette frem forslag til eventuelle omlegninger av virksomheten, særlig med henblikk på å få de yngre aktivt med i arbeidet. Komitéen skal avgi skriftlig rapport til Forbundsstyret snarest og senest innen neste landsmøte.»

Post nova vigla diskuto elektigis jenaj kiel membroj de la komisiono: Frank Aasheim, Oslo, prezidanto; Otto Prytz, Oslo; Per Johan Krogstie, Loten; Johan Matland, Sauda, kaj Trygve Kvalvåg, Stavanger.

7) *Elektioj*: Okazis jenaj elektioj unuanim: Prezidanto: C. Stöp-Bowitz (reelektio) Vicprez.: Kjell Gustavsen, (reelektio) Ĝenerala sekretario: John Berggreen (nova) Sekretariino: Signe Haug, (reelektio) Kasisto: Karl Ekhaugen, (reelektio) Estraranoj: Olav Rygg, (reelektio) Kirsten Ek, (nova)

Anstataŭantoj: Harda Danielsen, (reelektio) Alfred Skyberg, (reelektio) Otto Koren, (nova), ĉiuj el Oslo.

(Berggreen akceptis la proponon pri si mem nur kondiĉe ke ne estas trovebla alia kandidato, ĉar li principe ne ŝatas la «soldatojn de Tordenskjöld» pactempe!)

Konsilantaranoj:

Herolv Olsen, Tromsø, (nova) Doris Birkelund, Bergen, (nova) Trygve Kvalvåg, Stavanger, (reelektio) Ragnvald Rian, Trondheim, (reelektio) John Hammond Rosbach, Sarpsborg, (reelektio).

Revizoroj: John Selbekk, Oslo, (reelektio) Karin Sandberg, Oslo, (reelektio).

8) *Eventualajoj*:

Berggreen prezentis proponon pri pli preciza nomigo de la laborkunsidoj dum la Landaj Kongresoj, nome la vorton ĝenerala kunsido. Oni (kontraŭ 3 voĉoj) akceptis la proponon petante la Estraron prezenti konforman statutŝanĝan proponon al la venonta Landa Kongreso.

La sukcesplenan Landan Kongreson fermis la prezidanto C. Stöp-Bowitz dankante al Sauda Esperantoklubb pro la bonega aranĝo, la kunvenprezidanton Johan Matland pro taŭga kunvenvidado, kaj la partoprenantojn pro la aktiva partopreno. Fine li salutis al ĉiuj Esperanto-kluboj en Norvegujo.

La kunsido finiĝis lundon la 15-an de majo je la 13-a.

Raportis

Aslang Refsing kaj John Berggreen.

La 40a Norvega Esperanto-Kongreso

Dum la Pentekostaj tagoj okazis en Sauda nia 40a landa kongreso (de nun ni nomas la landajn kunvenojn kongresoj en Esperanta teksto, konforme al la termino uzata en aliaj landoj). Alvenis kongresanoj, pli ol 60, el multaj lokoj, de Kristiansand sude ĝis Alta norde, kaj jam je la alveno ni ekhavis imponon pri la perfekta aranĝo: lokaj esperantistoj ĉeestis ĉie por akcepti kaj bonvenigi alvenantojn, ĉe ŝipoj kaj aŭtobusoj, kaj en ĉiuj hotelĉambroj Esperantlingvaj afiŝoj kaj kongresaj programoj atendis la gastojn.

Sabaton vespere okazis la Interkonatiga Vespero en Sauda Klubb. Komuna manĝo ĉe bele aranĝita tablo, tre bonvena al lacaj vojaĝintoj. Salutparoladoj de reprezentantoj diverslokaj. Kafo kaj tortoj ornamitaj per la kongresa emblemo el verda marcipano. Dancado kaj vigla interbabilado.

La plej grandan parton de la dimanĉo kaj lundo okupis la laborkunsidoj, pri kiuj vi trovos raporton aliloke en ĉi tiu numero. Ankaŭ tiuj kunsidoj okazis en Sauda Klubb, la Kongresejo, en granda bela kaj tre taŭga salono, kie troviĝis ankaŭ budo de Eldonejo Esperanto.

Dimanĉon vespere okazis la granda kongresa festeno en Sauda Fjord Hotel. Belege aranĝita tablo kaj tre bongustaj manĝaĵoj. Bonegan prologon legis la prezidanto de La Esperantoklubo de Sauda, Johan Matland. Festparoladon faris la prezidanto de N.E.L., C. Stöp-Bowitz, por la virinoj parolis John Berggreen. Fine Harda Danielsen transdonis belan florzavon al Stöp-Bowitz okaze de lia 20-jara jubileo kiel prezidanto de N.E.L. Kafo en apuda salono. Dancado laŭ muziko de piano kaj akordiono, «plifortigita» ankaŭ per la akordiono de Stöp-Bowitz.

Dum paŭzo en la dancado eniris la procesio de la Ordeno de N.E.L., Pro Merito. La gradon Komandoro de la 2a klaso ricevis Elna Matland, Kavaliro de la 1a klaso Bjørn Ottesen kaj Tharald Dybing, kaj estis nomataj 3 novaj Kavaliroj de la 2a klaso: Sigmund Blikshavn, Ole Johan Rønnevig, Erling Vorland, ĉiuj el Haugesund. Pli poste en la vespero Otto Prytz gajigis nin per voĉlegado de diversaj amuzaĵoj. Fine mendita aŭtobuso reportis nin al nia hotelo. Forts. s. 79.



FERVOJISTA PAGO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA
FERVOJISTA ASOCIO — NEFA
Redaktoro: Odd Kolbrek, Kallbakkstubben 22,
Oslo 9

La uzo de Esperanto en la reklamo de Norvega Ŝtata Fervojo

En la ĵus eldonita jarlibro de UEA estas okulfrapa tutpaĝa anonco pri Norvega Ŝtata Fervojo.

En la anonco estas admono al la legantaro, ke ili skribu al nia norvega fervojadministracio, petante senpagajn broŝurojn en la Internacia Lingvo.

Jen ni volas klarigi, kiujn broŝurojn la fervojadministracio sendas al la petantoj.

La plej grava estas broŝuro kun la titolo: Vojaĝu kun ĝojo, per Norvega Ŝtata Fervojo.

La teksto bonege informas pri la komforto, kiun la turistoj povas ĝui veturante en niaj trajnoj, kaj per belegaj, multkoloraj bildoj ĝi ilustras la diversajn pejzaĝojn, tra kiujn fervojoj kondukas.

Cetere estas en la broŝuro ampleksa landkarto pri Norvegujo, kun abundaj informoj pri la geografia situo de la lando, pri la grandeco de la plej grandaj urboj, pri la noktomeza suno, k.t.p. Alia broŝuro estas pri La Norvega Fervojmuzeo en Hamar, kiu sendube estas inter la plej bonaj en sia speco.

Ankaŭ tiu broŝuro estas abunde ilustrita per multkoloraj bildoj.

Se oni en nia fervojadministracio ricevas multajn petskribaĵojn pri tiuj broŝuroj, oni sendube ekhavas la impreson, ke Esperanto estas tre taŭga lingvo en la reklamo, eble tiam aperos pluraj presaĵoj, en formo de turistbroŝuroj, aŭ eble la klariga teksto al la internaciaj figuroj en la horaro ankaŭ povus aperi en la Internacia Lingvo en «Rutebok for Norge».

Tial ankaŭ NEFA instigas al ĉiu norvega esperantisto: Igu viajn eksterlandajn amikojn, ĉie ajn en la mondo peti tiujn broŝurojn ĉe:

Norges Statsbaner, Presse- og Opplysningskontoret, Storgt. 33, Oslo.

ANKAŬ NEFA DISTRIBUAS BROŬURON

Al la 17a IFEF-kongreso en Hamar en 1965 la fervojo helpis, kaj eldonis ampleksan informkajeron en Esperanto pri la popolmuzeo Maihaugen en Lillehammer.

Tiu kajero enhavas 30 paĝojn, kaj 9 ilustraĵojn.

Se vi deziras ricevi ĝin, skribu al: Per Johan Krogstie, Løten, kaj aldonu 2 internaciajn respondkuponojn por la afranko.


LA NORVEGA FERVOJMUZEO

Neniu norvega fervojisto povas eviti iam konatiĝi pri nia fervojmuzeo en Hamar.

NEFA estas inter la diversaj fervojistaj asocioj, kiuj ekonomie apogas la fervojmuzeon, kaj ankaŭ praktike ni helpis.

Esperantisto, kiu vizitas la muzeon, povas legi la diversajn informojn pri la grandega lokomotivo «La Dovrepatro», kiu troviĝas tie en propra halo, inter diversaj lingvoj ankaŭ en la internacia. Tiun tradukon faris NEFA por la muzeo.

FERVOJISTA PAGO volas prezenti serion pri nia fervojmuzeo, sub la titolo: GUSTU-MAĴOJ DE LA FERVOJMUZEO, kaj per bildoj kaj teksto ni esperas veki al vere granda apetito, kaj al vizito en la muzeo, por ke oni en detaloj rigardu la vidindaĵojn, veturu per la liliputa Aurskog—Høland-fervojo tra la muzeparko, kaj studu la evoluon en la Norvega fervojosistemo de la komenco en la 1840—50-jaroj, ĝis hodiaŭ, kaj ankaŭ la planojn por la estonteco.



ŜRAŬBILO POR RELSPINT-BOLTOJ DE LA OFOTEN-FERVOJO

En la skatolo estas la jena teksto (tradukita el la norvega) «Jen unu el la du ŝraŭbiloj por relspint-boltoj, uzitaj de fervojdirektoro Fleischer, Norvegujo, kaj ĝenerala direktoro Nordström, Svedujo, kiam la norvegaj kaj la svedaj relparoj kunŝraŭbiĝis ĉe la landlimo la 15an de novembro 1902.»

La alia ŝraŭbilo troviĝas en la sveda fervojmuzeo en Stokholmo.

La Ofoten-fervojo, kiu dum la jardekoj transportis milionojn da tunoj da erco de la svedaj montoj al la eksporthaveno en Narvik, estis dum la solena inaŭguro en 1902 la plej norda fervojo de la mondo.

LA 40a NORVEGA - - (Forts. fra side 77.)

London la laborkunsido daŭris ĝis restis nur precize tempo por lunĉo antaŭ la foriro de la ŝipo; ne restis tempo por ekskurso. Sed, kiel prave rimarkigis iu Sauda 'ano: la vidindaĵojn de Sauda oni povas vidi el la urbo mem, ekskurso kondukus nin nur en la negamasojn sur la ĉirkaŭaj montoj!

Grandan dankon ni ŝuldas al la diligentaj aranĝintoj, la estraro de la Esperantoklubo de Sauda, antaŭ ĉio al ges.roj Elna kaj Johan Matland. Ĉio estis perfekta, ĉiujn detalojn oni pripensis. Laborplenaj estis la kongresaj tagoj, sed malofte la traktadoj estas tiom seriozaj, kaj malofte kongresanaro tiom «tenas sin al la temo», kiom ni spertis ĉi-jare.

KONGRESO DE IEAV

Internacia Fervojista Kontraŭalkohola Asocio aranĝos sian kongreson en Järvenpää en Finnlando (37 km norde de Helsinki) en la tempo 12.—20. 6. 1967.

Dum la kongreso oni aranĝas tuttagajn ekskursojn per trajnoj, aŭtobusoj kaj ŝipoj diversdirekten, inter alie dufoje al Helsinki. Menciinda en la kongresprogramo estas la planita kunveno de Esperantista Rondo inter la abstinaj fervojistoj.

Oni atendas al la kongreso kiel eble multajn esperantistojn, por montri la avantaĝojn helpe de la Internacia Lingvo.

Detalojn volonte sendas al vi: S.ro Matti Voltti, Tempelikatu 25 B 47 Helsinki 10. Finnlando.

Norvega Kroniko

Red.: KARSTEN LANGSHOLT

Klubo Esperantista en Oslo.

6/4. 67. Astrid Mansrud rakontis pri «Travivaĵoj en Usono». Ŝi vojaĝis al Usono por ĉeesti preĝejankonferencon en Salt Lake City, kaj studi lernejojn kaj muzikon. Ŝi faris aŭtobusvojaĝon tra Usono kaj vizitis interalie California kaj New York. La prelego

Ni estas je unu bela travivaĵo pli riĉaj, kaj kun plezuro ni denove iam kongresos en Sauda.
Partopreninto.

estis tre interesa kaj la kolorlumbildoj, kiujn ŝi montris, tre belaj.

Kirsten Ek diris memorigajn vortojn pri Julio Baghy.

Nia gasto Erling Næss salutis de la klubo en Trondheim. La prez. dankis kaj petis lin transdoni niajn plej sincerajn salutojn al Grupo Esperantista de Trondheim.

17/4 67. La prez. John Berggreen deziris koran bonvenon al la kunveno, kiu estis dediĉita al la memoro de D-ro Zamenhof, kiu mortis antaŭ 50 jaroj — la 14-an de aprilo 1917. Sur tablo sur la podio estis bela aranĝo; La busto de nia Majstro estis ĉirkaŭita de blankaj diantoj, flavaj tulipoj kaj kandeloj. La prez. enkondukis, dibrante interalie ke D-ro Zamenhof ne nur agis por solvi la lingvajn problemojn, sed donis al la mondo la ŝlosilon al la homaj koroj. Ĉie en la esperanta mondo oni honoras la memoron de Zamenhof — ankaŭ Klubo Esperantista en Oslo. Li donis la vorton al la preleganto C. Stöp-Bowitz, kiu parolis pri «La kreinto de Esperanto». Li komencis per diri ke la 14-an de aprilo ni solenas la memoron de tiu homo al kiu ni ŝuldas nian lingvon, la 15-an de decembro ni jam multfoje aŭdis pri la laboro por krei la lingvon. Hodiaŭ pli konvenas paroli pri lia idealismo. Li ĉiam laboris por homarantismo kaj mondpaco. Estis terure por li kiam li survoje al la Pariza Kongreso en 1914 aŭdis pri la eksplodo de milito en Eŭropo. Li aperigis leteron al la diplomatoj, sed neniu diplomato atentis pri liaj ideoj kaj pensoj, kiuj estis parencaj al tiuj kiuj poste starigis la Ligon de Nacioj post la unua mondmilito, kaj U.N. post la dua. Kiam li mortis en 1917 ekstingigis unu el la plej grandaj filoj de la mondo, kaj hodiaŭ UNESCO honoras d-ron Zamenhof kiel unu el la plej grandaj homoj en la mondo.

Poste Tom Arbo Høeg treege bele kaj klare deklamis du poemojn de Zamenhof, nome «La preĝo sub la verda standardo» kaj «La Vojo».

Finiĝis la oficiala parto de la memor-kunveno per unuminuta paŭzo.

Dum la kafopaŭzo ni kolektiĝis ĉe tablo bele ornamita per floroj kaj kandeloj.

Raportis Harda Danielsen.

Kristiansands Esperantoklubb.

Zamenhofa memorkunveno 13/4. Parolado de Helge Grøntoft pri Zamenhof. Tiam ni ricevis panon kaj kafon de Sigurd, kaj spiritan buteron kaj sukeron de sinjorino Hauge. Post fino de la «psikosomatika» manĝo, ni ricevis pianomusikon de Birger.

Skorovas Esperantoklubb, Skorovatn.

26/4 ricevis la klubo viziton de Israelano Itamar Even-Zohar kun edzino. La saman vesperon ni arangis festkunvenon en «peisestua» de societdomo por la gastoj kaj la kvin membroj (el kiuj nia klubeto konsistas), kaj kelkaj invititoj. En tiu okazo ĉiuj instruistoj de la loko, kaj ankaŭ la malnovaj membroj de la klubo, kun edz(in)oj, entute dudek du personoj. Post bonvenigo de la prezidanto paroladis Even-Zohar en Esperanto pri la temo: «Kiel fariĝis Hebrea denove vivanta lingvo.» Resume tradukita norvegen. Li ankaŭ montris du filmojn de Israelo. Dum la regalo, kiu konsistis el teo kaj buterpano pasis interbabilo vigla kaj amikeca. Ĉiuj esprimis plezuron pro la sukcesa kaj interesa kunveno. Kaj la eksterlandaj ĉarmaj gesinjoroj gajnis la korojn de ĉiuj ĉeestantoj.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.32

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun

adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.

Telefona: 54 727